

Malnetajxo: La Kreiva Liberverkaro kaj Projekto Gutenberg

La Kreiva Liberverkaro kaj Projekto Gutenberg

far Robert L. READ

Ĉi tiu prelego havas kvin faktaj partoj, kaj post tio, mi donos opiniojn.

La kvin temoj estas:

1. enkonduko de la ideo de la kreiva liberverkaro
2. diskuto pri la usona kreiva liberverkaro movado,
3. rilatoj de la liberverkaro movado al la esperanto movado,
4. la nuna stato de la esperanta kreiva liberverkaro,
5. Projekto Gutenberg kaj la lastatempa progreso per tiu, kaj kiel vi povas helpi.

Post tio, mi esprimos mian personajn opiniojn kaj ideojn pri kial ĉi tio gravas kaj post tio respondos al demandoj.

La anglaj vortoj "creative commons", kiun mi tradukas kiel "kreiva liberverkaro", estas la tuta aro de verkoj libere uzeblaj. Per verko, mi celas literaturon, bildojn, fotojn, filmojn, softvaron, kaj eĉ pli novajn komunikilojn, ekzemple la virtualajn mondojn de komputludoj. Per "libere uzebla", mi celas pli facile, senkoste, kaj libere uzebla ol kutima eldono. Ekzistas gamo de uzebleco; ekzemple, iu ajn rajtas citi mallongaĵon de kopirajtitaj verkoj, sed por citi longan citaĵon oni bezonas permeson de la kopirajtposedanto.

Aliaj verkoj, ekzemple la tuta komputila mastruma sistemo nomita "Linukso", estas senkoste havebla, laŭ iom da kondiĉioj. Eĉ pli libere uzeblaj estas verkoj en la publika regno (angle: "public domain"). Ekzemple, la verkoj de Ŝejkspiro estas en la publika regno, kaj iu ajn rajtas uzi ilin iel ajn, sen kondiĉioj.

En Usono (kiu estas la sola lando pri kiu mi scias sufiĉon por diskuti), estas movado por plivastigi la kreiva liberverkaro. La ideo de ĉi tiu movado estas ke la mondo pliboniĝas kiam la kreiva liberverkaro kreskas. Iuj pensas ke la liberverkaro riĉigas la ekonomion; aliaj pensas ke, ĉu bona ideo aŭ ne, la homaro havas rajton uzi verkojn, kiun la leĝo de la ŝtato ne tute rajtas kontraŭstari. Unu el la nunaj herooj de ĉi tiu movado estas Richard STALLMAN, (riĉard stalman), kiu instigis kaj la fonduson GNU kaj la fonduson FSF (Free Software Foundation, aŭ Libera Softvaro Fonduso), kaj kiu parte inspiris kaj faciligis la Vikipedion, la libere kaj senkoste uzebla

interreta enciklopedio. Aliaj instigintoj pri la temo de literaturo estas Michael HART (majkel hart) kiu kreis Project Gutenberg (Projekto Gutenberg), kaj la advokato Lawrence LESSIG (lorens lesseg), kiu subtenas per leĝo la kreiva liberverkaro. S-ro Cory DOCTORROW (kori daktoro) estas verkisto kiu enmetis ĉiujn el siaj rakontoj en la liberverkaro. Anoj de la kreiva liberverkaro movado plejparte rezistas plifortiĝon de la nuna kopirajtaj leĝoj. Unu de la slogano de la movado estas "Informo deziras esti libera."

La zamenhofa menso kaj la interna ideo favore agordiĝas al la liberverkaro movado, eĉ se oni povas kredi je unu kaj alia. Certe, esperantaj libroj estas plejparte eldonitaj por merito kaj famo, ne por mono. Ankaŭ, originale estas la ideo ke la internacian lingvon posedas ĉiu; ne estu monopolo pri ĝi. Samtempe, esperantistoj tute komprenas ke la grandeco kaj havebleco de granda literaturo estas la plej brila sukceso kaj plej bona argumento por esperanto kontraŭ aliaj planlingvoj kiuj celas same. Ekzemploj de penoj krei grandajn, facile haveblajn arojn de verkoj estas: la libroservo de ELNA mem, la libroservo de la UEA, kaj la grandega reta literaturo de Don HARLOW. Speciale menciinda estas la komputila libraro "eLibrejo" kiun kreis forpasinta Franko LUIN, kiu celas liberverkarajn ideojn. Tiuj gravaj penoj ne tute estas precizaj ekzemploj de kreiva liberverkaro ideoj, tamen ili certe estas laŭ la animo de la ideo. Ankaŭ menciinda estas Farbskatolo (aro de senkoste spekteblaj filmetoj), kaj la sonlibro je Literal Systems, la Esperanto Vikipedio, kaj nenombreblaj retpaĝaroj de unuopaj esperantistoj kiuj tiel publikigis siajn verkojn. Laŭ mi, la nuna kreiva liberverkaro de esperanto estas grandega kaj ŝvelanta, kaj fonto de fiero por ni.

Projekto Gutenberg (PG) estas speciale grava ilo de la kreiva liberverkaro. Ĝi estas interreta librarego de 18 mil titoloj, de kiu oni elŝutas libron du milionfoje ĉiumonate. Laŭ mi ĝi estas la plej grava el la liberaj libraroj, pro tri kialoj: granda, fama, kaj laŭleĝeco. Kreita de Michael Hart je 1971, ĝi estas fama, kaj bone subtenita per mono kaj homoj. Ĝi neniam malaperis. Ankaŭ, ĝi tute sekvas la usonaj kopirajtoj leĝoj, zorge kontrolante ke ĉiu dokumento, kiun ĝi publikigas ne kontraŭas la leĝon. Tiu ne gravas multe por la legantoj, sed tute gravas por aliaj kiuj deziras uzi la verkoj aliamaniere. Ekzemple: ĉu oni deziras adapti al filmo La Murdoj de Kadavrejo-Strato? Se vi akiras la tekston de PG, estas tute klara ke vi rajtas. Ĉu oni deziras kolekti kaj represi grandan aron de rakontoj de iu ĝenro? Nu, se vi prenas la tekston el PG, vi rajtas kaj ne devas timi ke oni minacos vin per proceso. Pro ĉi tiuj tri kialoj, mi pensas ke ĉiu esperanta libro en PG kaj plifortigas la

movadon al esperantistoj, kaj ankaŭ vidigeblas Esperanton al la ne-jam-esperantistoj. Mi juĝas ke la dua celo estas la plej grava.

Mi devas ekspliki ke mi ne tute komprenas la kopirajtan situacion de la eLibrejo libraro fare de Frank LUIN; mi suspektas ke ĉiu libro tie estas malsama. Tamen, ĉu ĉiu estas en ordo laŭ usona leĝo aŭ ne, estus bona se ĉiu taŭga libro en la eLibrejo ankaŭ estus en PG, por ke la anglaparolantoj vidu ke Esperanto estas grava, vivanta lingvo. La eLibrejo, kaj, ekzemple, la retpaĝaro de Don Harlow, helpas esperantistoj kaj eĉ komencantoj, sed estas nevideblaj al ne-jam-esperantistoj.

Ankaŭ, PG postulas simplan, komputila-legeblan formon, kiu helpas onin kiu deziras represi aŭ reuzi la tekston en alia formo.

Nun mi rakontos al vi personan sperton. Mi aroĝis ke mi povas traduki rakontojn, kaj fakte fuŝe faris iom. Poste mi aĉetis kaj legis la libreton, La Falo de Uŝero-Domo, tradukon far Edwin GROBE de la fama rankonto de POE. Tuj mi komprenas, ke, eĉ se mi esperas iam kontribui rekte al esperanta literaturo, la plej grava afero por mi mem estas konservi kaj havebligi la tradukaron de Prof-o GROBE. Lerninte la regulojn de PG, mi telefonis Edwin GROBE kaj ekplikis la aferon al li, kaj li akordis kaj finfine subskribis leteron al PG kiu enmetis sian tutan esperantan tradukaron en la publika regno. El liaj dek ok libretoj, eble dek du estas laŭleĝaj laŭ usonaj kopirajta leĝo. Sed problemo aperis: li verkis ilin, plejparte, ne per komputilo, sed per eksmoda maŝino de kiu oni ne povas preni la tekston elektronike. Do, efektive, la libroj ekzistas nur sur papero, kaj li fotokopiis ilin kiam iu mendis.

Tial, mi kaj teamo de laboremuloj nomita "Team Esperanto" ĉe "Project Gutenberg's Distributed Proofreaders" aŭ "PGDP" devis elspezi eble po du dek horojn por ĉiu libro. PGDP estas retpaĝaro kaj komunumo kiu subtenas PG-on per la skanilo kaj pruvlegado de surpaperaj verkoj por enretigi ilin. Oni rajtas viziti PGDP kaj pruvlegi unuopa paĝo de skanita verko por skaneroj; oni povas elspezi nur kvin minutoj sur paĝo. Per skanado, literlegado, kaj pruvlegado, nun Team Esperanto enmetis 7 de la GROBE-rakontoj en PG, kaj nun laboras pri la aliaj. Steven BREWER, William PATTERSON, Andrew SLY, Dale GULLEDGE kaj mi aktive, sed ne formale, gvidas "Team Esperanto". Ĉijare, la esperanta verkaro ĉe PG ŝvelis de 6 libroj ĝis 13 libroj. Kiam ni atingos 50 libroj, la nomo "Esperanto" saltas al la plej videbla listo de lingvoj. Mi devas menciigi ke Andrew SLY kontaktis Odd Tangerud, kiu tradukis la teatraĵojn de Henrik Ibsen, kaj akiris lian akordon kaj subskribon,

tiel komencinte ilian finfinan haveblecon per PG. Ankaŭ, Steven BREWER atingis permeson de la Esperanto-Asocio de Britio por lernolibro, kaj Ĉeko Miroslav MALOVEC donis alian libron kiu estas jam havebla.

Ni petas vian helpon. Oni povas helpi diversmaniere. Se vi vizitos Projekto Gutenbergon kaj legos la librojn, tio montros ke oni uzas ilin. Se vi aliĝos al "Team Esperanto" ĉe PGDP, vi povos helpi nin dum liberaj minutoj per la kontrolado de unuopaj paĝoj per via komputilo.

Plej grava, tamen, estas la donaco de la permeso uzi kaj liberpublikigi novajn tekstojn, aŭ la prunto de malnovaj libroj por skani. Ĉu vi posedas librojn aŭ gazetojn, kiuj estis publikitaj antaŭ 1923? Se jes, kontaktu nin, kaj eble ni povas skani ilin. Ĉu vi persone posedas kopirajton de bela aŭ grava romano, poemaro, lernolibro, libro de rakontoj, eseoj, teatraĵoj, aŭ alia libro? Ĉu vi estas en esperanta asocio aŭ eldonejo kiu posedas kopirajton de libro, ĉu nune presata kaj aktive vendata aŭ nun malnova kaj malofte aĉetata? Ni petas ke vi pripensu ĉu permesi nin liberpublikigi ĝin per PG, por plivastigi ĝian legantaron. Eble ĉi tiu malgrandigos vian profiton pro perditaj vendoj, aŭ eble ĝi multobligos ĝin per famigo de la libro. Notu ke, eĉ se la libro aperas senkoste en la reto, ankoraŭ eblas eldoni ĝin libroforme -- oni ne perdas la rajton vendi ĝin. Multaj homoj, kiuj trovas libron elektronike, ankoraŭ volas aĉeti presitan ekzempleron. (Cory DOCTOROW notas, ke havebligo de senpagaj e-tekstoj ne malhelpas la vendon de la paperaj eldonoj de liaj verkoj; kaj la eldonejo Baen Books konstatis ke havebligo de senpagaj tekstoj plimultigis la vendojn de malnovaj libroj en papera eldono.)

Do, estas multaj uloj kiuj nun laboras je "Team Esperanto", sed ni bezonas plu. Oni povas helpi kun nur ŝpareblaj minutoj per la softvaro de PGDP. Se ĉi tiu interesas vin, bonvolu kontakti min.

\* \* \*

Ĝis nun, mi diskutis faktojn; nun mi deziras prezenti al vi opinion kaj vidon.

Imagu mondon je 2010 en kiu la Esperanto movado estas la plej entuziasma subtenanto kaj uzanto de la kreiva liberverkaro movado. Imagu ne 13, sed 130, altkvalitaj libroj senkoste kaj libere uzeblaj ĉe PG. Imagu ke plejparte novaj esperantaj libroj estas tuj haveblaj interrete, dum la paperaj ekzempleroj estas presata. Imagu centoj da horoj de la esperanta muziko

senkoste aŭskultebla. Imagu maron de verketoj, kreitaj de kulturo kiu pripensas publikigi en kreiva liberverkaro antaŭ pripenso de nelibera eldono. Imagu ke iu ajn rajtas kolekti kaj reformi tiujn eseojn kaj poemojn kiel ajn plaĉas. Imagu ĉiun gazeton kaj bultenon tuj haveblan interrete, kaj libere disigeblan, rekunigeblan, kaj represeblan. Imagu ĉiun artikolon en la "Scienca Revuo" tuj legeblan; imagu ĉiun belartaĵon en Fonto tuj legeblan kaj reuzeblan.

Imagu ke, ĉar estas liberverkareska, ke ĉiu rakonto kaj poemo en Fonto estas rapide aŭskultebla kiel sonlibroj aŭ MP3. Imagu ke Esperanto estas la unua lingvo en PG por kiu ĉiuj libroj havas sonlibrajn versiojn.

Imagu ke la mil esperantaj libroj nun aĉetablaj de la UEA paŝon post paŝo liberiĝas per donaco aŭ aĉeto de kopirajton. Imagu mil esperantajn librojn en PG.

Imagu Pasporto al la Tuta Mondo en PG, senkoste kaj tuj spektakla per ĉiu ajn komputiloj. Imagu centoj de uloj kun vidkameraroj, kreante filmetojn, de kaj novaĵo kaj arto kaj muzikludo. Imagu ne televidkanalon, sed telvidmaron de senkoste, libere videbla enhavo.

Imagu ke la angla-parolantaro demandas "Kial ni ne povas esti kiel la esperantistoj"?

Antaŭ ol vi nomos min frenezulo, mi petas ke vi pripensu:

1. La plejparto de la Esperanto tradukado kaj verkado nuntempe estas sindone farita sen antaŭvido de mono,
2. Surprize, liberpublikigado ofte plialtigas profiton, ĉar verkoj ne estas malabundaj rimedoj, kiuj sekvas la ekonomian leĝon de ofertado kaj mendado. Do grandigi la ofertadon povas grandigi la mendadon.
3. La esperanta movado jam montris sian kapablon krei grandegan aron de literaturo; daŭra kresko de ĉi tiu kapablo promesas multon.
4. La samideanoj emos akordi la celon kaj metodon de la kreiva liberverkaro movado.

Do mi demandas al vi: kiel ni povas realigi ĝin?

Referencoj:

- \* Project Gutenberg: (<http://www.gutenberg.org>)
- \* Project Gutenberg's Distributed Proofreaders (<http://www.pgdp.net>)
- \* Team Esperanto at PGDP:

(  
<http://www.pgdp.net/c/stats/teams/tdetail.php?tid=74>)

\* Wikipedia: (<http://www.wikipedia.org/>)

\* Free Software Foundation: (<http://www.fsf.org/>)

\* Lawrence Lessig: (<http://www.lessig.org/>)

\* eLibrejo: (<http://esperantujo.org/eLibrejo/>)

\* Don Harlow's literature site:

(  
<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html>

)

\* Literal Systems:

(  
<http://literalsystems.org/>

)

By Robert L. Read at 2006-07-19 21:59 |